



# ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto. Nord-Pas-de-Calais & Picardie

## Kunsido de la Federacia Komitato

Dato : 20 NOV 2005	Horaro : 9 <sup>a</sup> 30 ĝis 13 <sup>a</sup> 00 (3 h 30 min)
Loko : Bersée (59) – Urbodomo, placo <i>Maréchal-Alexander</i>	

### Tagordo :

1. Protokolo de la pasinta komitatkunsido
2. Oficialigo de la ŝanĝo de Estraro kaj sidejo en la prefektejo
3. Eŭropa Rendevuo de Morbecque
4. Reorganizo de la Federacia Komitato (modifo de la interna regularo)
5. Elekto de oficiala emblemo de la Federacio uzota en ĉiu federacia dokumento
6. Membraro kaj financoj
7. Ekzamenoj
8. Eksteraj rilatoj en Esperantujo
9. Federaciaj kongresoj
10. Diversaj demandoj

### Kunvokitoj :

		Ĉeestis	Senkulpigis	Ne ĉeestis
• Xavier Dewidehem, prezidanto.....	XD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• France Valet, vicprezidanto.....	FV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jean-Michel Dechaume, sekretario.....	JMD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jacques-Henri Poiteau, kasisto.....	JHP	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Lucien Bourgois .....	LB	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Michel Dechy.....	MD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Jean Dietrich.....	JD	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Marie-Jeanne Liné ( <i>donis rajton al JHP</i> ).....	MJL	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Claude Longue-Épée.....	CLE	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Lucie Mazurkiewicz .....	LM	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Arlette Plutniak.....	AP	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Edmond Plutniak.....	EP	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Richard Valet.....	RV	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
• Xavier Vilain.....	XV	<input type="checkbox"/>	<input checked="" type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>

Sume, 13 komitatoj ĉeestas (12) aŭ estas reprezentataj (1) : la kvorumo estas atingita.

N.B. : La reprezentataj komitatoj estas signitaj per kursivo en la voĉdonrezulto.

### Aneksa(j) :

1. Modifoj de la interna regularo de la Federacio
2. Listo de la konstantaj komisionoj kaj de ties membroj
3. Oficiala emblemo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio

### 1. Protokolo de la pasinta komitatkunsido

Decido :

La protokolo pri la federacia komitatkunsido de la 22<sup>a</sup> de Majo 2005 estas aprobita sen modifo.

Poras : Unuanime (13)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

### 2. Oficialigo de la ŝanĝo de Estraro kaj sidejo en la prefektejo

Notoj : **1.** La situacio de la Federacio ĉe la prefektejo koncerne la novan statuton kaj la ŝanĝon de Estraro kaj sidejo estis enordigita pasintsomere. La deklaroj estis portitaj al la subprefektejo de Valenciennes.

**2.** Laŭ la ŝtata administracio, statuto ĉiam indiku sidejan poŝtadreson. Sekve, post ĉiu ŝanĝo de federacia prezidanto, oni tuj modifu la statuton por indiki la novan sidejan adreson. La Federacio ja konservas la principon, laŭ kiu la Federacio sidas en la rezidejo de sia prezidanto.

### 3. Eŭropa Rendevuo de Morbecque

Notoj : **1.** La Eŭropa Rendevuo de Morbecque (ERM) okazis en 5–6NOV2005, akceptis 97 partoprenintojn, kaj donis profiton je ĉ. 800 €. El la financoj de ERM-2004 restas ĝirota profitparto al la societo Yvonne-Martinot. – **2.** Se komence la ERM estis ĉefe afero de la societo Yvonne-Martinot, tamen jaron post jaro la Federacio pli kaj pli prizorgis kaj organizis ĝin. Tiel ke hodiaŭ evidentiĝas, ke pri la ERM kaj ties organizado fakte respondecas nur la Federacio. – **3.** La venonta ERM okazos en 18–19NOV2006 (t.e. escepte dum la *tria* novembra semajnfino).

Decido :

<i>Kio</i>	<i>Kiu(j)</i>	<i>Kiam</i>
<b>1.</b> Ekde la jaro 2005, la Eŭropan Rendevuon de Morbecque tute kaj plene prizorgas kaj organizas la Nordfrancia Esperanto-Federacio kiel nura respondecanto. Konsekvence, ĉiajn spezojn koncerne la aranĝon faras aŭ ricevas la Federacio.		
<b>2.</b> Ekde la jaro 2006, skipo da federacianoj kunordigita de la responsulo pri la Eŭropa Rendevuo de Morbecque surloke preparu la lokojn dum la sabata mateno.	FV + federacianoj	18NOV2006

Poras : Unuanime (13)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

### 4. Reorganizo de la Federacia Komitato (modifo de la Interna Regularo)

Notoj : Laŭ la projekto de modifo de la interna regularo proponita de la Estraro kaj aneksita en la kunsida kunvokilo. Okazis du modifoj de la projekto, nome : art. IV-3 (alineo 2<sup>a</sup>) por ebligi la komisioniĝon de nekomitatanoj, kaj art. IV-4 (4<sup>o</sup>, fine) por redakti la finon de la alineo pri la komisiono pri kulturo kaj aranĝoj.

Decido :

<i>Kio</i>	<i>Kiu(j)</i>	<i>Kiam</i>
<b>1.</b> La Komitato alprenas la modifojn de la interna regulo tiajn, kiajn ili estas prezentitaj en la aneksaĵo 1.		
<b>2.</b> La konstantaj komisionoj estas konsistigitaj, kiel indikas la aneksaĵo 2.		
<b>3.</b> Laŭ la artikolo I-4 (nova teksto), ĉiu asocio-membro elektu almenaŭ unu konstantan korespondanton por <i>Norda Gazeto</i> , kiu regule sendu al la ĉefredaktoro publikigotajn informojn pri sia asocio-membro.	Asocioj-membroj	FEB2006

Poras : Unuanime (13)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)



## 5. Elekto de oficiala emblemo de la Federacio uzota en ĉiu federacia dokumento

Decido :

La emblemo proponita de la Estraro laŭ desegno de XD (verda homo stelforma kaj ruĝkapa kradrita en flava koro) estas alprenita kiel la oficiala emblemo de la Federacio (vd. la aneksaĵon 3). Ĝin oni de nun uzu en ĉiuj dokumentoj el la Federacio, kun laŭeble kaj laŭ la preferordo : 1<sup>o</sup> la titolo *Esperanto-Nord* ; 2<sup>o</sup> la subtitolo *Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais et Picardie* ; 3<sup>o</sup> la adreso de la federacia retejo <http://esperanto.nord.online.fr>.

Poras : Unuanime (13)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

## 6. Membraro kaj financoj

Notoj : 1. La Federacio enkalkulis 150 fizikajn membrojn en 2005 (145 en 2004).  
2. La asocioj-membroj plej rapide sendu al kasisto JHP la liston de siaj membroj laŭ la artikolo II-4 de la interna regularo (kun indiko de la federaciaj membro-kategorioj).  
3. La Estraro informas pri sia nova politiko koncerne remembrigojn laŭ 4 punktoj :  
*a)* Nektizinto neniel rajtos ĝui eventualajn rabatarifojn kaj avantaĝojn specifajn por la federacianoj ;  
*b)* Du numeroj de *Norda Gazeto* kun remembrigilo estos senditaj al la ne-rekotizintoj en la nur unua nekotizita jaro, nome : la unua jara numero kaj la aŭtuna numero (kiu kutime entenas membrigilon) ;  
*c)* En Februaro-Martio de la unua nekotizita jaro, relanĉa retmesaĝo estos sendita al la ne-rekotizintoj Retanoj ;  
*d)* Eblos (re)membriĝi surloke okaze de federaciaj aranĝoj : tiel estos surloke disponeblaj membrigiloj.  
4. CLE zorgos pri la interŝanĝoj de la membrolistoj inter la Federacio kaj UFE kaj partoprenos la relanĉan agadon.

## 7. Ekzamenoj

Notoj : 1. La ekzamensio okazis en Bersée en 26JUN2005 laŭ nova sistemo laŭ interkonsento kun FEI, kaj akceptis 15 ekzamenitojn, el kiuj 14 sukcesis. La sesio en 2006 okazos laŭ la sama sistemo.  
2. La Estraro alvokas la lokajn klubojn por trovi ekzamenlokon por la sesio de 2006 laŭ la jenaj kondiĉoj : dum junia dimanĉo ; almenaŭ 4 ĉambroj ; fotokopiilo ; laŭeble trajna atingebleco.

## 8. Eksteraj rilatoj en Esperantujo

Notoj : 1. UFE : Prezidanto XD informas, ke ekde nun la tagordoj de la federaciaj kunsidoj (escepte de la estraraj) estas komunikitaj al la estraro de UFE. – La venontjara landa kongreso okazos en Rennes en 5-9MAJ2006. Tiu de 2007 okazos verŝajne en la Dijona regiono. – La estraro de UFE instigas al kandidatigoj por la renovigo de la komitato okaze de la landa kongreso en 2006.  
2. Federacioj : Pasintsomere estis rekreita la Normandia Esperanto-Federacio. XD certigis la normandian prezidanton Sébastien Erhard pri la preteco de nia Federacio helpi kaj kunagadi.



## 9. Federaciaj kongresoj

Notoj : 1. La venonta federacia kongreso okazos en 2APR2006 en Oignies, kie ĵus kreiĝis nova Esperanto-klubo dank' al Michel Carton. Baldaŭ pliaj informoj estos en *Norda Gazeto* kaj en la retejo.  
2. La Estraro instigas la lokajn klubojn esplori siaflanke la eblojn organizi la federacian kongreson en 2007 (inter Marto kaj Majo) kaj rilati kun la prezidanto aŭ la Estraro.  
3. En 2008 centjariĝos la Federacio (kreita en 1905 en Armentières). La Estraro deziregas okazigi specialan « centjariĝan kongreson ». Krome, ĝi starigis la projekton redakti la sekvon de la verko de Ernest Deligny pri la historio de la Federacio (1935–nuntempe).

Decido :	Kio	Kiu(j)	Kiam
1.	La Komitato taskas la Komisionon pri Kulturo kaj Aranĝoj : pripensi kaj prezenti okaze de la venonta komitatkunsido proponojn pri la formo, la enhavo kaj la eventualaj ĉirkaŭaĵoj de la « centjariĝa kongreso » de 2008.	Komisiono pri Kulturo	MAJ-JUN2006
2.	Estas kreita <i>Speciala Komisiono por la Verkado de la Historio de la Federacio</i> :		
a)	Ĝia celo estas : surbaze de arkivoj, redakti la sekvon de la verko <i>Historio de la Nordfrancia Esperanto-Federacio</i> far Ernest Deligny, t.e. verki la federacian historion de 1935 ĝis hodiaŭ ; eldoni tiun verkon (« dua volumo ») kaj reeldoni la verkon de Deligny (« unua volumo ») plej malfrue en printempo 2008, antaŭ la « centjariĝa kongreso ».	Komisiono por Verkado de la Historio de la Federacio	Printempo 2008
b)	Ĝin prezidas XD kaj konsistigas ĉiuj federacianoj interesitaj pri la temo kaj la taskoj. Oni informu pri la komisiono kaj invitu la federacianojn partopreni ĝian laboron. Por tio ili rilatu kun XD.		

Poras : Unuanime (13)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

## 10. Diversaj demandoj

Decido :

1. La Federacio kaj la asocio-membro Arras-Espéranto kunorganizos en Arras en 17DEC2005 (Zamenhof-festo) prelegon far Willy Koukouvi pri « Esperanto : lingva solvo por Afriko ». Tiukadre, la Federacio pagos 100 € cele al la preleganto.
2. La Federacio invitas ĉiujn klubojn kaj esperantistojn rilati kun CLE por donaci ne plu uzatajn Esperanto-lernlibrojn al la Esperanto-movado de Afriko, aparte tiu de Burundio.

Poras : Unuanime (13)

Sindetenas : – (0)

Kontraŭas : – (0)

Kromaj informoj :

1. La Federacio plene atentu kaj aktivu pri komunikado al la eksterularo : ĝi invitu gazetaron kaj publikon okaze de ĉia federacia aranĝo aŭ kunveno, fakiĝu pri komunikado per ekz. trejnadaj, seminarioj, fakaj prelegoj, k.s.
2. La asocio-membro Dunkerque-Espéranto ne rezignas pri la komitatana posteno lasita de Pascal Vilain, kaj venonttempe sciigos la nomon de lia anstataŭonto.
3. Okaze de la pasintsonoma komitatkunsido de JEFO, fino Julia Hédoux el Bulonjo-ĉe-Marzo fariĝis la nova kasisto de JEFO. La Federacio gratulas ŝin pro ŝia nova, landskala ofico.

Protokolo farita la 18<sup>an</sup> de Januaro 2006.

XAVIER DEWIDHEM  
Prezidanto

JEAN-MICHEL DECHAUME  
Sekretario



## Aneksaĵo 1.

### Modifoj de la interna regularo de la Federacio

1. Estas aldonita al la **artikolo I-4** dua alineo, kiu tekstas jene :  
« L'organe est réalisé par les soins d'une équipe de rédaction que coordonne un rédacteur en chef, sous le regard du président de la Fédération au titre de directeur de la publication. L'équipe de rédaction comprend notamment un correspondant permanent pour chaque Association adhérente. Le rédacteur en chef est membre de droit de la commission de la communication. »
2. Estas aldonita nova **artikolo I-6**, kiu tekstas jene :  
« La Fédération organise, dans la mesure de ses moyens, une session régionale d'examens d'espéranto en collaboration avec l'Institut français d'espéranto au moins une fois par an, de préférence en fin d'année scolaire. »
3. Estas aldonita nova **parto IV « Les commissions du Conseil fédéral »**, kiu tekstas jene :  
« **Art. IV-1.** – Le Conseil fédéral comprend, outre le Bureau, des commissions permanentes et, le cas échéant, des commissions spéciales.  
« **Art. IV-2.** – Des *commissions spéciales* peuvent être créées par le Bureau ou le Conseil fédéral dans le but d'accomplir une mission spéciale et ponctuelle.  
« Elles sont composées de membres physiques de la Fédération désignés par le Bureau. Leur président est choisi par le président de la Fédération.  
« Les commissions spéciales sont dissoutes une fois leur mission accomplie. Toutefois, elles peuvent être dissoutes prématurément sur décision de l'instance qui les a créées.  
« **Art. IV-3.** – Les *commissions permanentes* sont des groupes de réflexion, de proposition et de travail sur des domaines ou des matières qui leur sont affectés. Elles ne détiennent pas de pouvoir de décision, lequel appartient à l'Assemblée générale, au Conseil fédéral et au Bureau.  
« Elles sont composées des membres du Conseil fédéral et, le cas échéant, de membres physiques de la Fédération qui en font la demande. À leur entrée en fonction, les membres du Conseil fédéral doivent choisir une commission au moins ou deux commissions au plus dont ils feront parties, ce choix pouvant être modifié en cours de mandat. Elles sont chacune présidées par le président de la Fédération ou par un autre membre du Bureau.  
« **Art. IV-4.** – Le Conseil fédéral comprend quatre commissions permanentes, lesquelles sont :  
« 1<sup>o</sup> La *commission de la coordination régionale*, chargée notamment de veiller au renforcement des actions régionales et aux relations de la Fédération avec les associations d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais et Picardie, les autres fédérations régionales françaises d'espéranto et l'association nationale Espéranto-France ;  
« 2<sup>o</sup> La *commission de la communication*, chargée notamment de veiller à l'organe *Norda Gazeto*, au site Internet, au forum Internet, à la promotion de l'espéranto, à celle des actions et manifestations de la Fédération et des Associations adhérentes et d'assurer un service de réponse ;  
« 3<sup>o</sup> La *commission de l'enseignement et des examens*, chargée notamment de veiller à l'organisation des sessions régionales d'examens d'espéranto et au soutien aux cours d'espéranto dispensés dans les Associations adhérentes ;  
« 4<sup>o</sup> La *commission de la culture et des manifestations*, chargée notamment de veiller à l'organisation des congrès fédéraux et des Rendez-vous européens de Morbecque, à la coopération avec l'association nationale Espéranto-France en vue de l'organisation de conférences à travers les régions Nord-Pas-de-Calais et Picardie et à l'organisation ou au soutien d'actions en matière de culture, de tourisme ou de jumelage international entre associations ou entre personnes publiques. »
4. Estas aldonita al la **vortprovizo** la jenaj terminoj :

« commission permanente :	konstanta komisiono ;
« commission spéciale :	speciala komisiono ;
« commission de la coordination régionale :	komisiono pri regiona kunordigado ;
« commission de la communication :	komisiono pri komunikado ;
« commission de l'enseignement et des examens :	komisiono pri instruado kaj ekzamenoj ;
« commission de la culture et des manifestations :	komisiono pri kulturo kaj aranĝoj ;
« correspondant permanent :	konstanta korespondanto. »



## Aneksaĵo 2.

### Listo de la konstantaj komisionoj kaj de ties membroj

- Komisiono pri Regiona Kunordigado** (*commission de la coordination régionale*) :
  - Xavier Dewidehem, prezidanto
  - Claude Longue-Épée : rilatoj kun la publikaj instancoj kaj oficialuloj, interŝanĝo de la membro-listoj inter la Federacio kaj UFE
  - Re prezentantoj de la Federacio ĉe UFE : XD (ĉefreprezentanto) kaj CLE (viceprezentanto)
- Komisiono pri Komunikado** (*commission de la communication*) :
  - Xavier Dewidehem, prezidanto : retejo, retforumo
  - Lucien Bourgois : revuo Norda Gazeto (ĉefredaktoro)
  - Michel Dechy : rebata servo, rilatoj kun la neesperantista gazetaro
  - Edmond Plutniak
  - Richard Valet : revuo Norda Gazeto
  - Xavier Vilain
- Komisiono pri Instruado kaj Ekzamenoj** (*commission de l'enseignement et des examens*) :
  - Xavier Dewidehem, prezidanto
  - Jean-Michel Dechaume
  - Michel Dechy
  - Jean Dietrich
  - Claude Longue-Épée : ekzamenoj
  - Arlette Plutniak : ekzamenoj
  - Edmond Plutniak : ekzamenoj
- Komisiono pri Kulturo kaj Aranĝoj** (*commission de la culture et des manifestations*) :
  - Xavier Dewidehem, prezidanto : federaciaj kongresoj
  - Jean-Michel Dechaume
  - Marie-Jeanne Liné
  - Lucie Mazurkiewicz
  - Arlette Plutniak : prelegvojaĝoj
  - France Valet : Eŭropa Rendevuo de Morbecque
  - Richard Valet : Eŭropa Rendevuo de Morbecque

Atente notu, ke :

- La komitatanoj povas libere ŝanĝi sia(j)n komisionaneco(j)n kaj zorgi pri nova(j) aŭ alia(j) tasko(j) kiam ajn dum sia mandatperiodo, kondiĉe ke ili informas la prezidanton pri tio.
- Ĉiu interesita fizika federaciano povas peti al la prezidanto por komisionaniĝi.
- La plena listo de la komisionoj kaj ties membroj kaj ĝiaj eventualaj modifoj estas publikigitaj i.a. per la federaciaj revuo kaj retejo.

## Aneksaĵo 3.

### Oficiala emblemo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio



Kolora emblemo



Nigra-blanka emblemo

La emblemo konsistas el verda homo stelforma kaj ruĝkapa kadrita en flava koro. La stiligita homo simbolas la antaŭenemon kaj iniciatemon de la Federacio, kaj la koro – la kunecon kaj solidarecon ene de la Federacio. Verdo simbolas esperon, Esperanton kaj la regionon Picardie, flavo – agemon kaj la regionon Nord-Pas-de-Calais, kaj ruĝo – forton kaj viklecon.

